

Heinrich Heine,
Milde fluas tra la kor'

tradukita de Valentin Melnikov

Milde fluas tra la kor'
kanto primavera.
Flugu, melodi-sonor',
en la vast' aera.

Flugu longe, sen ripoz',
super domoj flutu.
Se troviĝos tie roz' –
gin de mi salutu.

...

Heinrich Heine,
Softe vibras tra l'aním'

tradukita de Kálmán Kalocsay

Softe vibras tra l'aním'
melodi' tenera,
flugu al la malproksim',
kanto primavera!

Flugu al florbeda dom',
kaj se tie ĉarme
ridos roz', en mia nom'
sin salutu varme.

...

Heinrich Heine,
Printemps saluto

tradukita de Ludwig Emil Meier

Iras ĉarma sonoret'
Tra de mi animon.
Sonu printemo kantet'
En la malproksimon!

Ĝis la dom' forsonu vi,
Kie floroj pendas!
Diru al la roz', ke mi
Saluteton sendas.

...

Heinrich Heine,
Frühlingsbotschaft

Leise zieht durch mein Gemüt
Liebliches Geläute
Klinge, kleines Frühlingslied,
Kling hinaus ins Weite.

Kling hinaus, bis an das Haus,
Wo die Blumen sprießen,
Wenn du eine Rose schaust,
Sag, ich laß sie grüßen.

...

Traduko de la Germana poemo “Frühlingsbotschaft” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de Valentin Melnikov.

Arg-527-1044 (2010-03-15 17:53:18)

Tiu ĉi poem-esperantigo estas - kun permeso de s-ro Valentin Melnikov - prenita el ties reta kolekto <http://www.esperanto-mv.com/ru/Melnikov/Heine.html>. Vidu ankaŭ: <http://www.esperanto-mv.ru/Melnikov/index.html>.

pp.ru/Melnikov . Vidu: http://www.esperanto-mv.com/ru/Melnikov/Heine.html . Vidu ankaŭ: http://www.esperanto-mv.ru/Melnikov/index.html .

Traduko de la Germana poemo “Frühlingsbotschaft” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaločajo, *1911 – †1976).

Arg-527-1088 (2010-05-27 11:29:19)

El la poezia volumo “Kanzonoj de Heine”.

Traduko de la Germana poemo “Frühlingsbotschaft” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 – †1919) en 1908.

Arg-527-1045 (2010-03-14 15:53:26)

Tiu ĉi esperantigo de la poemo estas vere iom fuĝe tradukita. Gi aperis en programo de koncerto el la jaro 1908 (laŭ informo de la dana s-ano Lars Kromann [lars.kromann@mail.dk]). Pri Ludwig Emil Meier rigardu ankaŭ la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier. Li verkis interalie la kant-libreton “Esperantista Kantaro”, kiu aperis en 1907 ĉe la Esperanta eldonejo de Hans Theodor Hoffmann en Berlino.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17).

Arg-527-1043 (2010-03-14 15:54:47)

Tiu ĉi poemo troviĝas interalie ankaŭ en la reta kolekto “Gutenberg.Spiegel” sub http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&xd=1136&kapitel=10&chash=3da378c6dbfruehlin#gb_found.